GISTO, FEB,2006.

Georgo O. Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

MIA ERARO, KIE?

Verda popolo, ebria pro iom da scio, farigxas dangxera kontraù nia Movado. Anstataù aùskulti opiniojn, proponojn bonintencajn de samideano, gxi izolas lin/sxin. Tia sinteno sufokas elpensitajn iniciatojn kaj silentigas diligentulojn. Ankaù mi mem spertas tion. Okazis ke, chirkaù du jarojn antaù ol mortis la esperantista papo Karol Vojtila, mi sendis al UEA malferman leteron kun peto, ke gxi aperu publikigita en la oficiala organo, la revuo Esperanto, kun la celo levi lavangon da petskriboj al lia mosxto, ke li bonvolu fari ion specialan favore al la tutmonda E-movado. Gxi rezultigis tomban silenton. – Al tri kongresaj LKK mi proponis la enkondukon de DM-loto sed rezultis silento pri la ideo. – Al LKK-anoj de la 40ª BEK en nia chefurbo, mi utiltempe proponis la saman ideon kune kun la sugesto ke, per iniciato de niaurba LKK estu sendota, al lia mosxto la brazila prezidento Lula, petskribon proponante, ke li bonvolu flankenmeti la hegemonian "MADE IN BRAZIL" kaj adoptu la pli gxustan "FAR BRAZIL'" sur brazilajn varojn. Domagxo. La ideoj dronis en maro el malinteresigxo, por ne kvalifiki la maron laù gxiaj fiondoj.

SUROGATA PAROLIST(IN)O

Iam Gisto diskonigis inter nia VK-grupo, ke mi havas duonhoran programon en miaurba 105,9 Mhc FM-radio, sub la titolo EKOLOGIO, du fojojn monate. Aldone mi petis ke lertulo pri KD bv surbendigi pli aù malpli dek minutan paroltekston pri chirkaùmediaj problemoj, kiel ekzemple, ne misuzi akvon, ne detrui enurbajn arbojn, ne faligi arbarojn, peti kompaton favoran al forlasitaj hundidoj kaj katidoj, nepre ne mistrakti chevalojn dum ili laboras tirante pezajn sxargxojn, ktp. Tia teksto celas anstataùi min kiam mi, pro grava motivo, ne povos plenumi la kompromison. Post kiam oni dum tri fojoj forrestas, la utila spaco proponita de la Radio-estraro perdigxas La sxanco helpi, per klara prononco, restas malferma.

GRANDA DOMAGXO

Tutty's-estraro ne konsentas ke ni, longtempaj klientoj tie, frandu kunportitajn varojn ne acheteblajn en tiu lunchejo, ech ne dum specialaj eventoj. Tiaj kunsidoj rare okazas, tial gxi ja estas vera absurdo far la estraro. Chu grupa alparolo kapablos sxangxi la achan decidon? Validas provi.

DISKONIGU TUJ !

Informis nia zorgema samideano PT2CA =Enivaldo,Brazilja, pere de la e-reto:
Vakcino kontraù reno- kaj haùtkancero jam ekzistas! Gxi estis malkovrita de la brazila Dr° José Alexandre Barbuto, en la Hospital Sírio Libanês - Grupo Genoma.- Ties laboratorio, pere de doktorino Ana Carolina aù doktorino Karyn, respondas alvokojn per la telefon-n° 0800-7737327 kaj estas ankaù la e-adreso: wwwvacinacontracancer.com.br

MOVADO SEN NOMO

Bv manifesti sin al mi, chu vi, Gisto-leganto, rutine ricevas la bele presitajn levilkartojn, kiuj levas la animstaton de la homoj pere de frazoj sagxe elpensitaj.

GEORGO DE LA NEGXOJ

Denove mi vane atendis lian almenaù kometan viziton en mia Kaiurbo. Nu ja...miaj gekaruloj... poeto sxvebas en pli altaj niveloj ol ni povraj terotretemuloj. Eble tial ni ne baldaù meritos ke favora simumo pelos lin al POA, por ke lia mosxto iam povos provi Verdan Kafon inter ni. En la e-reto oni legis ke li forlasis la chefurbon de la gaùchaj vinfarejoj, urbo BentoGonsalves, nur en la 14ª chimonata, sen mencii kiom da gradoj sur la kompaso li alpruos post la tie, iomete ébria, inspirohava poetado far li.

PAROLADO GXIS LACIGXO

Daùras stare, ankaù dum 2006, mia invito al du personoj kiuj emas ne krokodili, por pasigi che mi, unu tutan tagon Bonvenus anonci la alvenon en Kaurbo chirkaù la 11,00h. Mi atendos,ni kune tagmangxos en bufedo kaj piediros 1200m gxis mia domo Komforto kiel la noblaj vizitantoj meritas mi ne povas proponi char mi logxas malriche, kiel chiu emeritulo. Buson en POA vi trafos iom antaù la 10h. Reiro al POA povos okazi je la 18ªh aù 19ªh. Temoj, validos: chiu ajn.

BONHUMORO far Ergoto de Bonaero

GEEDZOJ SEN KOMUNIKO (Kurtigite)

Pro iu kialo okazas, ke geedza komunikado suferas iomete da bremsado en iliaj chiutagaj hejmaj rilatoj. Nu ja, chiuj geedzoj jam spertis tion, dum longjara kunvivado, pro bagatela kverelo inter ili. La edzo cerbumis pri ebla motivo kiu kaùzis chifojan silenton inter ambaù...mi ne drinkas...ne kartludas che amikoj...ne restas eksterhejme gxis malfrunokte, ne sukcesas memori aferon, kio ne plachas al sxi. Ba, la moderna vivo kunportas tiajn vakuojn, kiuj izolas la parojn. Sed, kiu estas la kerno de la problemo? - Tiun vesperon li sidigxis je sxia flanko, sur la sofo. Li karesis sxian hararon kaj kveris kelkajn dolcxajn vortojn en sxian orelon. Sed, sxi tuj reagis preskaù kolere kaj protestis: “vi plej neoportune ekgxenas min, gxuste kiam mi sidigxas kaj volas spekti mian preferatan…” Mi ekfrapis mian frunton … televidilo!

MIELMONATO

Juna paro sidis en stacidoma atendejo, che multaj valizoj. Sxi blonda charmulino, diketa. Li brunulo, ne dika, videblis, ke li sxatus kisi la junulinon sed sxajne iom hontis. Mi sidis fronte al ili, kasxita malantaù malferma jxurnalo. Post kelkaj minutoj mi starigxis kaj kuragxige alparolis la junulon. – “Agu kvazaù mi estus nevidebla, ne gxenu vin, kisu la junulinon”. Tuj li agis. Li cxirkaùbrakis sxin kaj donis al sxi pasian kison. La blondulino eligxis de liaj brakoj, ekstarigxis, donis al mi tiel fortan vangofrapon ke gxi povus faligi chevalon kaj proteste diris: sentaùgulo, incitanta nekonatojn kisi min!
Mi plendos che la staciestro.